**2024.3.26 Francio**
USONO-EŬROPO-RUSIO
verkita de "Urso" (Éric Bernard COFFINET)

La dudeka jarcento formiĝis PER nafto kaj POR nafto. Oni militis POR nafto, oni venkis PER nafto kaj malvenkis PRO nafto... nafto fariĝis "nigra sango" viviganta nian mondon kaj nepre necesa al ĝi por potencaj motoroj kaj organika kemio. Dum la tuta dudeka jarcento Usono havis du konstantajn zorgojn : kontroli nafton kaj detrui Rusion por daŭre superregi la mondon.

Sekve de la unua mondmilito (1914-1918) disfalis pluraj eŭropaj imperioj kaj Eŭropo perdis sian riĉecon kaj sian potencon. Sekve de la dua mondmilito (1939-1945) Eŭropo perdis sian aŭtonomecon kaj eĉ sian liberecon. Ambaŭfoje profitis Usono kaj la financaj potencoj brit-usonaj.

En 1917 eksplodis revolucio en Rusio. Eŭropaj landoj, Japanio kaj Usono batalis kun la kontraŭrevoluciaj rusoj "blankaj" kontraŭ la komunistaj rusoj "ruĝaj". Japanio kaj Usono sendis trupojn al la ekstremorienta parto de Rusio por kontroli Siberion. Sed finfine venkis la bolŝevistoj... Ekde tiam Usono kaj la financaj potencoj brit-usonaj konstante strebadis al malfortigo de Rusio por prirabi siajn naturajn riĉaĵojn kaj malebligi ĝian aliancon kun aliaj eŭropaj landoj.

Tiuj, kiuj vere oponis kaj venkis la naziismon, ne estas la brit-usonanoj sed ja la rusoj. Inter la du mondmilitoj brit-usonanoj pro timo de la komunismo favoris per mono kaj politiko la disvolviĝon de la naziismo, por ke Germanio fariĝu forta armilo kontraŭ Rusio. Multaj politikistoj kaj eminentuloj okcidentaj, eĉ la brita reĝo Eduardo la Oka, estis favoraj al Germanio de Hitlero. Usono influis, por ke Germanio ne pagu ĉiujn siajn ŝuldojn post la unua mondmilito kaj plifortigu siajn industriojn. Britio ne konsentis, ke Francio ekmilitu kontraŭ Germanio en 1936, kiam la germanaj armeoj reokupis la dekstran bordon de la riverego Rejno spite al la pactraktato de Versajlo. Britio kaj Francio rifuzis aliancon kun Rusio kontraŭ Germanio kaj sekve okazis pakto inter Stalino kaj Hitlero en 1939.

Hitlero deklaris militon kontraŭ Usono en 1941 kaj sekve ĝi vole-nevole helpis Rusion (fakte vendis al Rusio). Sed ekde aŭtuno 1944 la ĉefo Allen Dulles de C.I.A. (Centra Informkolekta Agentejo de Usono) kaj germanaj militestroj sekrete kunvenis en Svislando por priparoli apartan pactraktaton inter Germanio kaj brit-usonanoj, cele al pli forta daŭrigo de ĝia milito kontraŭ komunisma Rusio. Pri tiu sekreta operaco nomita Sunshine (sunleviĝo) aludas en 1973 la fama sovetia spiona filmserio titolita "deksep momentoj de printempo", kiu grave influis la decidon de Vladimiro Putino fariĝi K.G.B-ano.

Post la dua mondmilito Usono ne daŭre persekutadis la naziistojn post la Nurenbergaj procesoj sed male varbis kaj protektis eminentajn fakulojn, sciencistojn, militistojn kaj politikistojn germanajn por kontroli Eŭropon kaj lukti kontraŭ Rusio. Ekzemple, Walter Hallstein estis komisiita de Hiltero en 1938 por jure plani "novan Eŭropon" sub kontrolo de Germanio (Das Neue Europa), kaj poste li estis enoficiigita de Usono kiel la unua prezidanto de la Eŭropa Komisiono de 1958 ĝis 1967 por starigi "novan Eŭropon" sub kontrolo de Usono (The New Europe).

Miĥaelo Gorbaĉevo konsentis la reunuiĝon de Germanio en 1990 kondiĉe ke O.T.A.N. (Organizaĵo de la Traktato de Atlantiko Norda) ne plu disvolviĝu orienten. Tion Usono promesis sed ne plenumis. Kiam disfalis U.R.S.S. (Unio de la Respublikoj Sovetaj kaj Socialismaj), Usono kaj la novliberalismaj potencoj okcidentaj kredis, ke ili finvenkis kaj daŭre plenumis sian planon por dispecigi Rusion kaj prirabi ĝiajn riĉaĵojn, dank'al Boriso Jelcino, rusaj oligarkoj kaj mafianoj prirabemaj. Kiam Vladimiro Putino proponis, ke Rusio kunlaboru kaj eĉ partoprenu al E.U. (Eŭropa Unio) kaj O.T.A.N, li ricevis firman rifuzon, ĉar tio ne kongruis kun celoj kaj planoj de Usono kaj de ĝiaj novliberalismaj potencoj financaj. Post plia disvastiĝo orienten E.U. kaj O.T.A.N. fine atingis la lastan barilon, Ukrainio, kiun Usono provis uzi kiel armilon kontraŭ Rusio ekde 2014. Tiam rebatis Rusio...

Kio rezultis el tiu konflikto ? Jam 500000 mortintoj kun ankoraŭ pli da vunditoj, da kripligitoj kaj da rifuĝintoj. Tiom da vidvinoj, da orfoj kaj da elmigrintoj ! Tiom da suferoj, da sango kaj da larmoj ! Ukrainio estas tute detruita kaj elsuĉita, eble baldaŭ dispecigota... jam parte vendita de Volodimiro Zelenskijo al internaciaj firmaoj kiel Monsanto aŭ BlackRock. Malfortiĝas ne Rusio sed la tuta okcidenta Eŭropo ekonomie kaj tra la mondo pli kaj pli kreskas koleregо kontraŭ Usono kaj ĝiaj eŭropaj vasalŝtatoj. Bone memoru tiujn vortojn de Henry Kissinger : "malamiki kun Usono estas dangere sed amiki kun ĝi estas pereige"...

**2024.3.26 フランス**

アメリカ、ヨーロッパ、ロシア

エリック・バーナード・コフィネット

20 世紀は石油によって、そして石油のために形作られました。彼らは石油のために戦い、石油を通じて勝ち、石油のせいで負けました...石油は私たちの世界に生命を吹き込む「黒い血」となり、強力なエンジンと有機化学にとって絶対に必要なものになりました。20 世紀を通して、米国は 2 つの懸念を常に抱えていた。それは、世界を支配し続けるために石油を管理することと、ロシアを破壊することだった。

第一次世界大戦（1914 ～ 1918 年）の結果、ヨーロッパのいくつかの帝国が崩壊し、ヨーロッパは富と権力を失いました。第二次世界大戦（1939 ～ 1945 年）の結果、ヨーロッパは自治を失い、さらには自由を失いました。どちらの場合も米国と英米の金融権力が恩恵を受けた。

1917 年にロシアで革命が勃発した。ヨーロッパ諸国、日本、米国は反革命的な「白」ロシア人とともに共産主義者の「赤」ロシア人に対して戦った。日本と米国はシベリアを制圧するためにロシア極東に軍隊を派遣した。しかし、最終的にはボリシェヴィキが勝利した…それ以来、米国と英米の金融勢力は、ロシアから天然資源を奪い、他の欧州諸国との同盟を阻止するために、ロシアを弱体化させようと絶えず努力してきた。

本当にナチズムに反対し、打倒したのはイギリス系アメリカ人ではなく、まさにロシア人だった。二つの世界大戦の間、イギリス系アメリカ人は共産主義への恐怖から、ドイツがロシアに対する強力な武器となるよう、金と政治によるナチズムの発展を支持した。多くの西側の政治家や高官は、イギリス国王エドワード 8 世さえも、ヒトラーのドイツを支持していた。米国は、ドイツが第一次世界大戦後にすべての債務を返済しないようにし、ドイツの産業を強化するように影響を与えた。1936 年にドイツ軍がベルサイユ講和条約に反してライン川右岸を再占領した際、イギリスはフランスがドイツと開戦することに同意しなかった。イギリスとフランスはロシアとの対ドイツ同盟を拒否したため、1939 年にスターリンとヒトラーの間に協定が結ばれた。

ヒトラーは 1941 年に米国に宣戦布告し、その結果、意図せずロシアを支援した（実際にはロシアに売られた）。しかし、1944 年の秋以降、CIA 長官アレン・ダレスは、 米国中央情報局とドイツ軍指導者らはスイスで密かに会談し、共産主義ロシアとの戦争をより強力に継続することを目的として、ドイツとイギリス系アメリカ人の間の個別の平和条約について話し合った。1973 年、「春の 17 の瞬間」というタイトルの有名なソ連のスパイ映画シリーズは、ウラジーミル・プーチンの K.G.B メンバーになる決定に大きな影響を与えたサンシャインと呼ばれるこの秘密作戦を暗示している。

第二次世界大戦後、米国はニュルンベルク裁判の後もナチスを迫害し続けず、逆にヨーロッパを統制しロシアと戦うために著名なドイツの専門家、科学者、軍人、政治家を採用し保護した。例えば、ヴァルター・ハルシュタインは、1938 年にドイツの管理下にある「新しいヨーロッパ」（Das Neue Europa）を合法的に計画するようヒルターから委託され、その後、1958 年から 1967 年まで米国によって初代欧州委員長に任命された。米国の管理下に「新しいヨーロッパ」を設立する（新ヨーロッパ）。

ミハイル・ゴルバチョフは 1990 年に、NATO（北大西洋条約機構）がこれ以上東に発展すべきではない、ということを条件にドイツの統一に同意した。それは米国が約束したが果たさなかったことだ。ソ連（ソビエト社会主義共和国連邦）が崩壊したとき、米国と新自由主義的な西側諸国は、ボリス・エリツィン、ロシアの寡頭政治、それとマフィアらのおかげで、ついに勝利し、ロシアを解体し、その富を略奪する計画を実行し続けたと信じていた。ウラジーミル・プーチン大統領が、ロシアは協力的であるべきで、さらに EU に参加することを提案したとき、EU と NATON から、これは米国とその新自由主義金融勢力の目標と計画に合致しないとして、彼は断固とした拒否を受けた。EU そして NATO がさらに東に広がり、2014 年以来、アメリカがロシアに対する武器として利用しようとしてきたウクライナに到達するという最後の線に到達したとき、ロシアは反撃した…

その対立から何が生じたのでしょうか？ すでに 50 万人が死亡し、さらに多くの負傷者、障害者、難民がいる。寡婦、孤児、移民がたくさんいるのです！あまりにも苦しみ、血と涙があった！ウクライナは

完全に破壊され、吸い取られ、おそらく近いうちに解体されるだろう…すでに一部はヴォロディミル・ゼレンスキーによってモンサントやブラックロックのような国際企業に売却されている。経済的に弱っているのはロシアではなく西ヨーロッパ全体であり、世界中で米国とそのヨーロッパ属国に対する怒りがますます高まっている。ヘンリー・キッシンジャーの言葉を思い出してください。「米国と敵対することは危険だが、米国と友達になることは致命的である」…

**2024.3.27 germanio**

VERDLULOJ EN ESPERANTO, MANFRED WESTERMAYER

Karaj geamikoj,

jen pri la aktualaj katastrofoj en Rusio - kun komparo al simila okazaĵo en Beslan.

2024-03-18 la prezidento en Rusio restos la sama, supozeble ĝis sia vivofino ?

Oni elektis, sed elekto estis mallarĝa. Putin kaj tri aliaj, kiuj ne tro ĝenis lin. La aliaj kandidatoj aŭ estis malliberigitaj kaj krome murditaj. Kaj unu lasta kiu ankoraŭ estas libera, kolektis la bezonatan nombron da subskriboj - ricevis la respondon ke ne sufiĉas; "ili" trovis sufiĉe multajn erarojn (ĉu sendependa organizo subkontrolis ? - supozeble ne).

Sed Navalnij antaŭe konsilis ke tamen eblas montri la nekonsenton.

Tute hazarde alveni je tagmezo de la lasta tago de tiuj elektoj - tion faris miloj en pluraj urboj, ne nur en Rusio, ankaŭ en eksterlando, fakte mi nur aŭdis de manifestaciantoj ke tio okazis je la konsulejo en Bonn/Germanio.

Eĉ bone estus elekti la unuan de la opoziciuloj, se oni ne konsentus, ĉar tiam estos malfacile de iu ajn ŝanĝi la rezulton.

Do, en la sola konsulejo en Germanio, Bonn (elekto-loko N-ro 3822) voĉdonis 5071 civitanoj:

Vlad. Putin ricevis 75% - Vlad. Davankov – 22,8 %

Bedaŭrinde pri Berlino (3815) mi ne trovis la nombrojn., vizitante: Germany.mid.ru

Dank' al Nowaya Gazeta (nun en ekzilo, ĉar enlande ne plu sufiĉas la aero por diri aŭ skribi kritikajn vortojn), venis listo de multaj eksterlandaj urboj kun la rezultoj: Jen https://novayagazeta.eu/articles/2024/03/22/foreign-insurgency-en

La ĉefa rezulta pri la eksterlandaj voĉdoni estis ke en 50% de tiuj (ĉ. 30) urboj tutmonde la alia kandidato ricevis pli da voĉoj ol la eterna prezidento.

Do, mi esperis ke post tiu plen-sukcesa elekto V.V. Putin povas regi pli trankvile.

\- - -

2024-03-25 Civila Katastrofo en rusa rok-koncerto Krasnogorsk / Moskvo

Sed la diablo* nur kaŝis sin, kaj sendis grupon da islamistoj kiuj kreis grandan civilan katastrofon en rok-koncerto en Crocus en la antaŭurbo de Moskvo.

Kondolencaj mesaĝoj venis de multaj registaroj, ankaŭ de Germanio. La Usona sekreta servo informis ke ili sendis mesaĝon al iliaj rusiaj kolegoj pri tia minaco, kelkajn tagojn

antaŭe. Putin komence eĉ ne menciis, ke ISPK (islamistoj kun ligo al Afghanio) asertis ke ili faris la atencon. Putin ne tuj komentis; eble li atendis ĝis oni trovis aŭtomobilon de eblaj atencantojn proksime de Briansk, do, proksime de Ukrainio. Sed de tie oni ankaŭ povas daŭrigi al la sudaj islamaj provincoj. Nur tiam li rakontis, kaj tiel sin-esprimis, ke ili plej verŝajne havis rilaton al Ukrainio, kaj "malferman fenestron" por enveturi en Ukrainion. Tio signifis, ke fakte temis pri atenco de Ukrainio kontraŭ rusaj civiluloj. Li ne prezentis pruvaĵon.
*) diablo en Moskvo ludas rolon en "La Majstro kaj Margarita" de M. Bulgakov.

Vi povas kompari tion kun Beslan 2004, tie mortis pli ol 300 (de 1100 ostaĝoj) - pri tio okazis multaj kritikaj demandoj. Kial oni venenigis en la aviadilon la rusan ĵurnalistinon Anna Politkovskaja, kiu alflugis por raporti. Ĉu kelkaj ostaĝoj estis mortpafitaj de la soldatoj aŭ de la islamistoj. ktp. Oni ne esploris la korpojn. Kial ili pafis per tanko - la rompita tegmento mortigis kaj vundigis multajn ostaĝojn. Evidente malpli gravis la vivo de la ostaĝoj (infanoj kaj gepatroj de nord-Osetio / Kaŭkazo)
Komence la oficiale informita kvanto da ostaĝoj estis nur ĉ. 10-ono de la reala nombro.
https://eo.wikipedia.org/wiki/Terorisma_atako_en_Beslano
Fakte: post Beslan V. Putin akrigis la gazetaran kontrolon kaj decidis malpermesojn. Plia paŝo al faŝisma reĝimo.
- - -

2024-03-20 Irina Ŝerbakova - intervjuo en la ekzilo

Jam pli longan tempon Memorial laboris sub la ordonita titolo „eksterlanda agento“. Ĵus antaŭ la komenco de la milito kontraŭ Ukrainio - en Februaro 2022 - ŝi devis forlasi Rusion, ĉar estis en danĝero esti malliberigita. En la sama jaro memoriala ricevis la Nobel-Premion por Paco.

Ŝi naskiĝis en Moskvo, familio parte venis el Ukrainio. Studis germanistikon. Kune kun Andrej Saĥarov kaj Lev A. Ponomarjov ŝi fondis Memorial en 1989 por esplori kio estis la vereco en la historio de Rusio - Homoj Rajtoj.
https://www.arte.tv/de/videos/113608-000-A/irina-scherbakowa-russlands-unbequemes-gewissen/
(dokumenta filmo ĝis 2024-06-10, 52 minutoj, en la franca kaj germana)

Parte dokumentaj videoj el pli fruaj tempoj, intervjuo post ŝia ekzilo en Israelo kaj Berlino, kie ŝi nun vivas - proksime al ŝia hejmlando Rusio.
- -
Dokumenta video pri la historio de Krimeo.
12 minutoj, en 6 lingvoj (de, en, es, fr, it, pl)

https://www.arte.tv/de/videos/114573-015-A/mit-offenen-karten/
- - -
Arĥipel Gulag publikigita antaŭ 70 jaroj.
kiel Aleksander Solŝenicin sukcesis priskribi la gulagan sistemon de Stalino.
https://www.arte.tv/de/videos/112855-000-A/der-archipel-gulag-ein-buch-mit-folgen/
- - - fino

**2024.3.27 ドイツ エスペラントの緑の党、マンフレッド・ウェスターマイヤー**

親愛なる友人へ、

これはロシアの現在の災害についてであり、ベスランで起きた同様の事件と比較しています。

2024-03-18 ロシアの大統領はおそらく人生の終わりまで変わらないのだろうか？ 選択はなされましたが、選択肢は狭かったです。プーチン大統領と彼にとっては問題にならない３人の選挙で、他の候補者は投獄されるか殺害された。そして、まだ自由な最後の一人は、必要な数の署名を集めましたが、それだけでは十分ではないという答えを受け取りました。「彼ら」はかなりの数の誤りを発見しました（独立した組織は十分にチェックしていませんでしたか？ - おそらくそうではありません）。 しかしナワリヌイ氏は以前、意見の相違を示す可能性は依然としてあると忠告した。

これらの選挙の最終日の正午に到着したのはまったくの偶然だった。これはロシアだけでなく海外でも、いくつかの都市で数千人が行った。実際、これがボンの総領事館で起こったことはデモ参加者からしか聞いていない。 /ドイツ。 合意がない場合は、誰にも結果を変えるのが難しいため、反対派の最初の者を選択することさえ良いでしょう。

そこで、ドイツ唯一の総領事館であるボン（選挙地番号 3822）では、5071 人の国民が次のように投票した。

プーチン大統領は 75％を得た –

ダワンコフ – 22.8%

残念ながらベルリン（3815）については数字が見つかりませんでした。訪問先: Germany.mid.ru Nowaya Gazeta (国内に批判的な言葉を言ったり書いたりするのに十分な空気がないため、現在亡命中）のおかげで、多くの外国都市のリストが結果とともに提供されました。

https://novayagazeta.eu/articles/2024/03/22/foreign-insurgency-en

外国人投票の主な結果は、世界中の都市（約 30）の 50％で、他の候補者が永遠の大統領よりも多くの票を獲得したことだった。それで、私は選挙が完全に成功した後、V.V.が成功することを望みました。プーチン大統領はもっと静かに統治できるだろう。

- - - 2024-03-25 ロシアのロックコンサートで民間災害 クラスノゴルスク / モスクワ しかし、悪魔*は姿を隠し、イスラム主義者のグループを送り込み、モスクワ郊外のクロッカスでのロックコンサートで大規模な市民災害を引き起こした。ドイツを含む多くの政府から哀悼のメッセージが寄せられた。 アメリカの諜報機関は、数日前にそのような脅威についてロシアの同僚にメッセージを送ったと発表した。プーチン大統領は当初、ISPK（アフガニスタンとつながりのあるイスラム主義者）が暗殺を実行したと

主張していることにも言及しなかった。プーチン大統領はすぐにはコメントしなかった。おそらく彼は、ウクライナに近いブリャンスク近郊で暗殺犯の可能性のある者の車が発見されるまで待ったのだろう。しかし、そこから南部のイスラム教地域へ向かうこともできます。そのときになって初めて、彼は彼らがウクライナとのつながりがあり、ウクライナに入国するための「開いた窓」を持っている可能性が高いと語り、こうして自らを表明した。つまり、実際にはロシア民間人に対するウクライナによる攻撃だったということだ。彼は何の証拠も提示しなかった。 *）モスクワの悪魔は、M. ブルガーコフの「巨匠とマルガリータ」で役割を果たしています。

これを（人質 1100 人中）300 人以上が死亡した 2004 年のベスラン事件と比較してみよう - それについては多くの重大な疑問があった。取材のために飛んできたロシア人ジャーナリスト、アンナ・ポリトコフスカヤ氏がなぜ機内で毒殺されたのか。人質の中には兵士かイスラム主義者によって射殺された人もいるのだろうか 等。 遺体は調査されなかった。なぜ彼らは戦車で発砲したのか - 壊れた屋根で多くの人質が死傷した。明らかに、人質（北オセチア/コーカサス出身の子供と両親）の命はそれほど重要ではありませんでした。当初、公式に発表された人質の数はわずか約 100 人でした。実際の数の 10 分の 1。https://en.wikipedia.org/wiki/Terrorism_atako_en_Beslano

実際、プーチン大統領が報道規制を強化し、報道禁止を決定した後。 ファシスト政権への新たな一歩。---2024-03-20 イリーナ・シェルバコワ - 亡命中のインタビュー 「メモリアル」は長い間、「外国エージェント」という所定の肩書きで活動してきた。2022 年 2 月に対ウクライナ戦争が始まる直前、彼女は投獄される危険があったため、ロシアを出国しなければならなかった。同年、「メモリアル」はノーベル平和賞を受賞した。彼女はモスクワで生まれ、家族の一部はウクライナ出身です。ドイツ語を勉強しました。 彼女はアンドレイ・サハロフやレフ・A・ポノマリエフとともに、ロシアの歴史における真実、つまり人権を調査するために 1989 年に「メモリアル」を設立した。

https://www.arte.tv/de/videos/113608-000-A/irina-scherbakowa-russlands-unbequemes-gewissen/（ドキュメンタリーは 2024 年 6 月 10 日まで、52 分、フランス語とドイツ語）一部は以前のドキュメンタリービデオで、イスラエルとベルリンに亡命した後のインタビューで、彼女は現在母国ロシアに近い場所に住んでいます。 -- クリミアの歴史を描いたドキュメンタリービデオ。 12 分、6 か国語 （ドイツ語、英語、スペイン語、フランス語、イタリア語、スペイン語） https://www.arte.tv/de/videos/114573-015-A/mit-offenen-karten/

**2024.3.27 Ĉeĥio**

Saluton sinjoro Jasuo.

Ukrajino atakis militan flug'gavenon en rusa Rjazanj kaj naftan rafinerion en Sarny. En rusa Bělgorod aktiviĝis Rusa legiono (unuig^o de rusaj civitanoj, kiuj decidis batali kontrau Moskva rej^imo). Kelkaj raketoj, kiuj rusoj pafis al Harkiv, falis en Bělgorod-regiono, ili ne ĝisflugis.

Milit'šipojn de RF Jamal kaj Azov estis grave difektitaj.

En vilaĝo Kozače en okupita Krimeo likvidita rafinerio.

Apud Moskvo en koncerta halo du Taĝikoj pafadis al homoj (en retejo oni informis ke pri atako respondecas tiel nomata Islama Štato).

Čiutage Harkiv kaj Sumy estas sub bomba atako (H-59), 19.03 7 homojn mortis, 10 restis sub ruinoj. 20.03 Kazacja Lopanj 65 atakoj dum tago, aviad'bomboj. Artilerio atakis Herson, vundita 75 jara virino.

En Sumy regiono pro konstanta rusa pafado 40 % de konstruaĵoj en ruinoj, vilaĝoj Velyka Pysarivka, Popivka, Lukašivka 20 % de loĝantaro estas pensiuloj. 31 raketoj atakis Kyjiv, čiuj estis likviditaj, sed splitoj vundis 7 homoj.

Vendrede al Ukrajino oni pafis pli ol 150 raketojn, 95 el ili estis likviditaj. Čiuj atakoj estis al energetia infrastrukturo. 22.03 Tuta Harkiv estas sen elektro energio (pli ol du milionoj da loĝantoj). Estis difektitaj presejo, meblo-fabriko, ceho de lakoj kaj farboj. Ĝenerale dum marto al Sumy Harkiv kaj Černihiv estis 280 artileriaj kaj aviaciaj atakoj. Rusoj ankau úžas kasetaj bomboj, en kiuj estas elementoj similaj al štalaj pilkoj, kiuj eksplodas. 27.03 estis vunditaj 19 civil'uloj, el ili 3 infanoj. En Černihiv oni purigis parcelon pli ol 60 gektarojn de minoj. Ankau estis difektita energetia strukturo en Odeso. Odeso estas sen lumo.

D nové rusa raketo alflugis al Pollando.

Čeha registaro aprobis pluan sumon pór ačeto de obusojn pór Ukrajino. Ankau Pollando aliĝis Islando kaj Portugalio. En tute 20 landojn. Čehio aldonos al restrikta listo du ekspolitikistojn de Ukrajino, kiuj perfidis sian popolon, kaj median agenturon, kiu disvastigis rusajn dezinformaciojn kaj strebis influi al balotojn pór Europarlamento.

Olga

**2024.3.27 チェコ共和国 こんにちは、ヤスオさん。**

ウクライナはロシアのリャザンにある軍用空港とサルニーにある製油所を攻撃した。ロシアのベルゴロドでは、ロシア軍団（モスクワ政権と戦うことを決意したロシア国民の団体）が発足した。ロシアがハリコフに発射したロケット弾の一部はベルゴロド地域に落下したが、標的迄届かなかった。

ロシア軍艦ジャマルとアゾフは深刻な被害を受けた。

占領下のクリミアのコザチェ村にある、製油所が破壊された。

モスクワ近郊のコンサートホールで、2 人のタジク人が人々に向けて銃撃を行った（ウェブサイトでは、いわゆる「イスラム国」が襲撃の責任者であると報じた）。

ハリコフとスームィは毎日爆弾攻撃（H-59）にさらされており、3 月 19 日には 7 人が死亡、10 人が下敷きになった。3 月 20 日にはカザチャ・ロパニが、日中６５回の攻撃、空爆を受け、75 歳の女性が負傷した。スームィ地方ではロシアによる絶え間ない銃撃により、建物の 40％が廃墟となった。ヴェリカ・ピサリフカ、ポピヴカ、ルカシフカの村では人口の 20％が年金受給者である。

31 発のロケット弾がキエフを攻撃し、すべて破壊されたが、破片により 7 人が負傷した。

金曜日、ウクライナに向けて 150 発以上のロケット弾が発射され、そのうち 95 発が破壊された。すべての攻撃はエネルギーインフラに対するものでした。

２２．０３ ハリコフ全土（住民２００万人以上）が停電。印刷所、家具工場、塗料工場が被害を受けた。全体的に見ると 3 月中には、スミ・ハルキウとチェルニーヒウに対して 280 発の大砲と空襲があった。ロシアはクラスター爆弾も使用しており、爆発する鋼球に似たもの入っている。3 月 27 日 民間人 19 名が負傷し、そのうち 3 名が子供であった。チェルニーヒウでは、60 ヘクタール以上の土地から地雷が撤去された。オデッサのエネルギー施設も被害を受けた。オデッサには電気が来なくなった。

ロシアのロケットがポーランドに向けて飛行した。チェコ政府は、ウクライナ向け手榴弾購入のための追加金額を承認した。ポーランドもアイスランドとポルトガルに加わった。合計 20 か国で。

チェコ共和国は、国民を裏切ったウクライナ出身の元政治家２人と、ロシアの偽情報を広め、欧州議会選挙に影響を与えようとした組織を規制リストに追加する。　オルガ